

Post D-ro Stanislav Kamarýt

En mens' plu sonas lia voĉo,  
kiu por ĉiam sonis for,  
kaj levas sin al sort' riproĉo  
kial jam devis veni hor'  
lasta sur lia vivhorloĝo.

Lin, kiu el unuaj estis,  
dum tuta vivo sen eklac'  
persiste luktis kaj modestis  
sub verda flado de la pac',  
admiron inda verk' postrestis.

Sur batalkamp' literatura  
ĝis fin' li staris en tranĉe'.  
en lingvistik', en verspolura  
kaj stilperfekta arta kre'  
li gvidis nin por man'sekura.

Eksprezidanto asocia  
kaj publicist' kaj redaktor',  
multajara aŭ Akademia,  
sed ĉefe – hom' kun nobla kor'  
restos model' eterne nia.

Sur vian tombon larmo falu,  
al via lasta tera lit,  
pri vi memoro ne forpalu,  
kara Doktoro Kamarýt,  
kaj via vork' al venk' signalu!

Jiří Kořínek  
1. 8. 1956

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkáč 26 je la 20-a horo.

Programo:

- 5.9. Josef Vítek: Universala Kongreso en Kopenhago.
- 12.9. D-ro Jaromír Jermář: Ĉe balkanlandaj esperantistoj.
- 19.9. D-ro Tomáš Pumpr: Lasta esperanta literaturo.
- 26.9. Jaroslav Šustr: El la leteroj de Ota Ginz.
- 3.10. Jaroslav Hebký: Rememoroj el mia mondmigrado /III-a parto/.

-----

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

Rikolto de morto...

MORTIS DRO STANISLAV KAMARÝT.

La ĉeĥoslovaka esperantisto perdis sian plej eminentan figuron; ekde komenco de la Esperanto-movado en tiu ĉi lando ĝis nun ne aperis en ĝi viro de simila signifo. El la tutmonda Esperanto-movado foriris unu el ĝiaj plej valoraj kunlaborantoj.

Dro Stanislav Kamarýt ne plu estas inter ni, li mortis la 30-an de julio en sia 73-a jaro.

Granda distanco nin dividis, kiam mi atingis la funebra sciigo. Mia doloro estis des pli intensa, mi ne povis ĝin dividi inter la multnombraj amikoj de la kara mortinto.

Kamarýt lernis Esperanton en 1900, li estas unu el la fondintoj de la organista Esperanto-movado en ĉeĥaj landoj, pionire aktiva senlace ĝis sia morto Liaj funkcioj en la Bohema Asocio Esperantista, poste sekvinta Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantisa kaj la lasta Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko, estis por li ĉiam funkcioj laboruj, egale ĉu li estis sekretario, vicprezidanto aŭ prezidanto de la nomitaj organizoj, ĉu prezidanto de la XIII-a U.K. en Praha, ĉu redaktoro de „Bohema esperantisto“, de „La Progreso“ aŭ do „Esperantista“ kun liaj nekalkuleblaj kontribuadoj, subskribitaj aŭ ne.

Li partoprenis en la internacia Esperanto-agado per multaj instigoj kaj grandsignifaj faroj, li ne konsideris nura honoro sian multjaran membrecon en niaj altaj lingvaj institucioj /Lingva komitato, Akademio/ kaj eĉ en ilin li klopodis enverŝi sian aktivecon. En grandaj entreprenoj esperantistaj de internacia signifo li senhezite akceptis la taskon de ĉeĥoslovaka kunlaboranto. La ciferoj kaj indikoj, kiujn li – ĉiam nepre en ĝusta tempo – liveris al tiuj enketoj k. s., estis ĉiam sobraj kaj plej seriozaj. En „Enciklopedio de Esperanto“ estis Kamarýt unu el la tre precizaj kunlaborantoj. Estis li, kiu instigis la relative grandan ĉeĥoslovakon partoprenon en la Internacia Esperanto-Ekspozicio en Montevideo.

Lia literatura agado estis tre ampleksa. Pri nia afero li verkis sennombrajn artikolojn kaj eseojn ĉeĥajn kaj esperantlingvajn, sed li estis ankaŭ talenta tradukanto de prozo kaj poezio. Lia redakto de Ĉeĥoslovaka Antologio“ /1935/, fundamenta libro de nia literaturo, estis unu el la multaj okazoj dum la lastaj jardekoj, kiam mi havis la pleuron kunlabori kun li. Ni posedas ankaŭ lian instruan verkon „Mezinárodní jazyk“ /Internacia lingvo/, aperintan en 1927 en la granda ĉeĥa eldonejo Vilímek, lian „Filozofian vortaron“ /1934/, lian Slovakon „Esperanto-ŝlosilon“ /en du eldonoj, dua en 1935/. Kiam evidentiĝis urĝa neceso posedi Historion de ĉeĥoslovaka movado, estis nur Kamarýt, de kiu oni povis bendi ĝian liveron Li senhezite promesis, diligentege eklaboris kaj lia manuskripto de verko plej kompetenta, kiun li preparis pasintjare, estas unu el liaj monumentoj. Kaj en la lastaj tagoj li laboris super la grandaj Esperanto-vortaroj de Filip, preparante ilin por nova eldono. Kamarýt estis ankaŭ aŭtoro de ĉeĥlingvaj filozofiaj traktaĵoj.

Ni ne plu aŭdos lian paroladon, kiu estis ĉiam ĝuo por la aŭskultantoj.

Kamarýt evitis kliŝojn, uzis neniun malplenan vorton, en ĉiu frazero enestis signifo kaj bona valoro. Li parolis kiel scienculo, majstranta plene sian temon, sed mirinde sperta ankaŭ en plej diversaj aliaj fakoj. Li instruis kaj sciis amuzi per siaj paroladoj, home klera kaj sprita. Karakteriza estis lia prononcmalmaniero kun vokaloj preskaŭ senescepte mallongaj. Neniam plu ni aŭdos liajn „Nepre!“, per kiuj li kutimis emfazi esprimojn akcentendajn.

Kiu konis doktoron Kamarýt, neniam forgesos tiun ĉi homon plenan de saĝo, homon de nobla karaktero kaj de plej bona koro. Mi perdis en li mian plej bonan amikon.

Ota Ginz /nun Kirjat Jam, Izraelo/

---

Dro Stanislav KAMARÝT mortis la 30-an de julio 1956. Lia neatendita subita foriro skuis korojn de ĉiuj, kiuj lin konis. Lasta adiaŭo kun li okazis la 3-an de aŭgusto en granda halo de krematorio en Praha-Strašnice. Krom vidvino kaj rondo geparenca ĉeestis multaj esperantisto-jel diversaj eĉ malproksimaj lokoj de Ĉeĥoslovakio. La ĉerko, sur kiu malgaje kuŝis la flago de Esperantista Klubo en Praha, dronis en abunda verdaĵo kaj lumoj. Inter multaj florkronoj ni vidis ankaŭ tiujn de Esperantista Klubo en Brno, Esperantista Klubo en Praha kaj de Universala Esperanto-Asocio, sur kie rubandoj, larĝaj kaj silkaj, estis vortoj: „Al memoro honora – Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. – En ĉeĥa lingvo adiaŭis la mormon s-ano Josef Vitek, prezidanto de TKKE. Esperante parolis prezidanto de EKP s-ano Jaroslav Šustr, kiu rememoris la grandajn aktivecojn kaj meritajn de dro Kamarýt sur ĉiuj laborkampoj de Esperanto kaj sur la literatua unualoke.

---

Kolonelo Antonín PLUHAŘ, malnova adepto de nia movado kaj membro de nia klubo mortis la 26-an de julio.

---

Karel ŠUSTR, patro de nia kluba prezidanto mortis la 12-an de aŭgusto. La fariĝis viktimo de sia helpem en la poresperanta aktiveco de sia filo. Li estis tiu, kiu ĉiutage zorgis pri ĝustatempa forsendado de registrita poŝto kaj de ĉiu poŝto por eksterlando. Li akcidentis dumire al la poŝtofiĉejo kaj mortis post 41-taga lukto kontraŭ la sekvoj de sia falo.

---

Jan VRZÁK, patro de nia poetino Eli Urbanová mortis la 8-an de aŭgusto 1956. Honoron al ilia memoro kaj profundan kunsenton al la familianoj.

EKP

----

MI KORE DANKAS al ĉiuj, kiuj rememoris kaj gratulis min okazde de mia 60-a naskiĝtago. Mi denove konvinkiĝas, kiom da bonaj amikoj mi lasis en mia patrujo. Ili bonvolu pardoni, ke mi ne povas danki ĉiun aparte.

Ota Ginz, Shd. Szold 11, Kirjat Jam Bet, Izraelo.

---

GEEDZIĜO: Niaj talentaj artgvidantoj de la Verda ĉaro de Julio Baghy Eva Suchardová kaj Antoni Seemann festos sian geedziĝon la 14-an de septembro 1956 /Malnovurba urbdomo je la 9-15-a horo/. Nian sinceran bondemndeziron kaj ĉion plej bonan en la komuna vivo!

---

Nia membro Josef Hiža plurfoje sendis al ni siajn salutojn el Hungarujo, kie li travivas feliĉe kaj kontente sian libertempo inter esperantistoj.

---

NIAJ GASTOJ EL EKSTERLANDO... Esperantista Klubo en Praha en la tempoj antaŭ la militoj ludis rolon de internacia rekontoj esperantista. Nun ŝajnas al ni, ke revenas tiu tempo, en kiu abundis fremdaj gastoj en nia urbo, kaj nia Klubo ree fariĝis trapasem por mutaj eksterlandaj gesamideanoj.

Vizitis nin:

POLO Jan Fethke, konata filma reĝisoro, kie sukcesaj filmoj estas ankaŭprojekciataj en nia lando, estas konata al multaj esperantistoj en Praha kaj aliloke.

#### **Praha-ek-1956-41-04**

BULTENO PRAHA 41-1956

- 4-

Sed al esperantistoj de la tutmondo li estas konata pro siaj romanoj originale verkitaj sub pseŭdonimo Jean Forge. – La 18/7 li ĉeestis nian kunvenon, paroladis kaj prelegis el siaj novaj verkoj. Dum sia vizito al Ĉeĥoslovakio li vizitis ankaŭ esperantistojn en Bratislava.

SVEDO: Gustav Nilsson vizitis kelkajn niajn kunvenojn, paroladis, veturis al SKED kaj ĉeestis SET. Ni tre ŝatas tiun ĉi simpatian svedon kaj neniel ni koleus kontraŭ li, ke iuj liaj prapraprapraavoj batalis kontraŭ Prahanoj eĉ sur la ponto de Karolo!

HUNGARINO Gize Köszegfalvi ĉeestis al kelkaj niaj kunvenoj ek de la 18/7. Ŝi paroladis kaj partoprenis vigle niajn diskutojn aj programoj kaj trovis sincerajn simpatiojn de ni ĉiuj. Kun bedaŭro ni konstatas, ke ŝi verŝajne kunprenis en Hungarujon parton de la koro de nia membro s-ano Hiža! Post ŝia forveturo li vagadis ĉi tie – ne bakita, ne kuirita – videble kormalsana ĝis li malaperis en – Hungario, kie li verŝajne jam trovis tion, kio mankis al li. Ni estas nur scivolaj ĉu revenos li aŭ ili!

GERMANO inĝ. Herbert Wohlfahrt el Forse bei Ascherleben vizitis nian klubestron, kiu kunvenigis kelkajn gesamideanojn en tiu momento atingoblajn. En la loĝejo de prof. Ŝt. Urban en amikaj interparoloj kaj diskutoj ni restis ĝis malfrua nokto.

POLO Jerzy Uspieński ĉeestis la kunvenon la 25-an de julio kaj informis nin pri multaj interesaj novaĵoj el frata Pollando.

JAPANO Satoŝi Ueda el Tokio aperis en la loĝejo de nia prezidanto pli frue ol la letero, per kiu Jpaana Esperanto-Instituto avizis lian viziton. Post nova migrado Ueda sanrevenis al Praha por ĉeesti kiel observanto al la 4a Internacia Studenta Kongreso. Ĉar ne estis tute certe ĉu li povos partopreni al la kluba kunveno, ni aranĝis apartan kunveneton la 28-an de aŭgusto, en kiu li havis la okazon de amikaj interparoloj kun ĉi tiu tre simpatia malofta gasto.

5 HUNGAROJ - oficiala reprezentantaro de hungaraj esperantistoj dum la 41-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago – revene le la kongreso vizitis nian ekstran kunvenon la 16-an de aŭgusto. Estis samideanoj Baghy, Balkányi, Domokos, Márton kaj dro Mátöffy el Budapeŝto. Vere fruktodona estis tiu ĉi amika renkontiĝo. Multaj aferoj estis pridiskutitaj, klarigitaj, kaj komuna nia vojo al venko de esperanto plifortigita. Ni tre kore dankas al niaj hungaraj amikoj, ke ili por sia vizito ebligis al ni ne nur reciproke personan konatiĝon, sed ke ili tiom kontribuis al plifortigo de amikeco inter la esperantistko de niaj landoj.

BULGARO Georgi Dolapĉiev, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio el Sofia ĉeestis la kunvenon la 15-an de aŭgusto, tre afable informis nin pri la UK en Kopenhago kaj pri la E-situacio en Bulgario post la landa kongreso. Ni tre ĝojis povinte frate saluti la ĉefan reprezentanton de la bulgara movado.

3 ge-BULGAROJ s-ano Vasil Ĉoĉov kaj s-ano Ŝoŝev kun sia edzino per siaj interesaj paroladoj kontribuis al agraba vespera kunveno la 22/8.

2 HUNGAROJ s-ano Ludvík Dernai el Budapeŝto tre agrable surprizis nin kun sia edzino dum la kunveno la 29an de aŭgusto. S-ano Dernai interese rakontis pri la II-a landa esperanto-renkontiĝo, kiu en la tagoj 18-20/8 okazis en Budapest.

NEDERLANDO s-ano J. E. Ptok dufoje vizitis nian prezidanton. Kortuŝa malgaja sorto de tiu ĉi simpatia junulo donas al ni ideon por rakonti pri ĝi sur la paĝoj de iu el venontaj numeroj de nia Bulteno aŭ dum iu el la kunvenoj de nia Klubo. Samideano Ptok nun laboras en Ĉeĥoslovakio en vilaĝo proksime de Praha kaj ni esperas pli ofte aŭdi de li.

-----

-----

ESPERANTISTOJ, KIUJ INTENCAS VIZITI NIAN ĈEFURBON KAJ VOLAS KONTAKTIĜI KUN NI, UZU AFABLE  
UNU EL KVIN TELEFONNUMEROJ EL LA NOVA TELEFONLIBRO SUB „E S P E R A N T O“ !

-----

-----

NI LEGIS . . . .

Sur la 285-a paĝo de BOLETIN de Hispana Esperanto-Federacio /majo 1956, n-o 5/ tutpaĝan recenzon de nia membro Dro Tomáš Pumpr Ĉu jam krias la koko?

sur la 149-a paĝo de Dia Regno /n-oj 7-8, julio-aŭgusto 1956/ duonpaĝan artikolon de Dro Z. Stejskal el Praha: Kiu estis sankta Johano Nepomucena?

sur la paĝo 110-a de ESPERANTO artikolon de la mortinta Dro Stanislav Kamarýt „Ĉeĥa dramo Mariŝa prezentita esperantlingve en Praha“ kaj sur la paĝo 107-a ni vidis belan bildon el la ekskurso de niaj klubanoj al Karlovy Vary.

en la bela ĵurnalo de 21/8/56 Drapeau rouge:

4le Congrès de l'Espéranto a Copenhague. La 4le congrès esperanto s'est tenu à Copenhague. Il a réuni 2300 représentant de 44 pays. Le gouvernement belge s'est fait représenter par M. Joseph Héron, président du groupe esperantiste verviétois. Le ministre des Affaires sociales de Finlande a pris la parole en esperanto. Des délégués des démocraties populaires et de la Chine étaient présents. Le congrès a notamment étudié le problème de l'ens???? simultanément. à titre expérimental dans quelques colonies de cinq pays différents, question actuellement en instance devant le Conseil de l'Europe. Le prochain congrès aura lieu à Marseille, en août 1957. – Pour recevoir une documentation illustrée concernant l'étude de l'espéranto et les deux premières leçons gratuites du cours par correspondance, écrire en se recommandant de notre journal, à Espéranto-Office /Serv.K./ 18, rue de Franquenic, Ottignies-Brabant, qui diffuse également un cours à la radio chaque jeudi, à 9 h 30 min, sur la Chaîne Nationale de la R. T. F.

UEA-JARLIBRO 1956, en gaja citronflava kovrilo sur bonega papero, estas en nia posedaĵo. Ĝi alvenis kun prokrasto, kiun klarigas la administrantino /ne „administranto“/ s-anino Marianne H. Vermaas en la nova UEA-sidejo Rotterdam. Ni estas feliĉaj, ke tiu libro, gravega por ĉiu aktiva esperantisto, venis en manojn de pli multaj ĉeĥoslovakaj samideanoj ol dum ultaj jaroj antaŭaj kaj ni esprimas la deziron, ke Ĉeĥoslovakio aperu denove en antaŭaj vicoj laŭ nombro de UEA-anoj.

Ŝajnas al ni, ke en la nunjara Jarlibro estas pli multnombraj eraroj ol kutime. Nur parte estas kulpa la transloĝiĝo el Anglio. Oni evidente ne sufiĉe atentis la ortografion de propraj nomoj, eble ankaŭ pro manko de necesaj preslitteroj – 14 eraroj estas en parto „Ĉeĥoslovakio“. Ni ne trovas ĝuste, ke profesio de la Delegitoj estas notata jen kun granda, jen kun malgranda komenca litero. „Idea“ en anonco de Belga E-Instituto /pĝ 36/ ne estas E-vorto, oni uzu „la sama“. Enestas ankaŭ preseraroj amuzaj. Ni legas pri iu amerika Delegito, ke li estas „akvokato“, pri alia en la angla Gateshead, ke lia stranga okupo estas „ekstervoja oficisto“.

Malgraŭ tiuj ĉi malgravaĵoj estas kaj restas UEA-Jarlibro 1956 ne malhavebla helpilo por ĉiu ano de nia movado kaj utiliga propagandilo /argumentu: 2249 Delegitoj en 61 landoj!/ en lia mano. O. G.

En 22 landoj Esperanto instruata en 142 lernejoj. Laŭ la enketo, kiun faris la Centro de Esploro kaj Dokumentado la instruado de Esperanto faris plej grandajn profresojn en Jugoslavio. En tiu ĉi lando oni ne povis provizore kontentigi pliajn postulojn pri la instruado de Esperanto pro manko de kvalifikitaj instruistoj. La ĵus fondita katedro de Esperanto en la Universitato de Zagreb kaj la instruado de la lingvo en pluraj porinstruistaj seminarioj sendube solvos la problemon jam en la sekvanta jaro.

ĈU VI JAM ALIĜIS AL LA TUTŜTATA ESPERANTISTA KONFERENCO EN OLOMOUC? NE FORGESU, KE FRUA ALIĜO SIGNIFAS NE NUR DISCIPLINON, SED ĈEFE GRAVAJN AVANTAĴOJN!  
TIAL ALIĜU ANKORAŬ HODIAŬ!

**Praha-ek-1956-41-06**

BULTENO PRAHA 41-1956

-6-

VIZITO DE ANNA ADAMO – SANDGREN. Al interesuloj ni anoncas, ke laŭ ŝia lasta telegrama sciigo, kiun ni ricevis antaŭ kelkaj tagoj, ŝi ankoraŭ ne ricevis la enirpermeson por ĈSR. Pozitivajn novaĵojn – se ni ricevos ilin – ni tuj sciigos al la respektive lokoj, kiuj montris intereson pri ŝia vizito.

Nia klubo ricevis vere multajn salutojn el la UK en Kopenhago kaj ni tre dankas al ĉiuj, kiuj dokumentis siajn simpatiojn al ni dum la brilaj tagoj de la esperantista mondparlamento! – Krome saman ĝojon kaŭzis la salutkarto de Raymond Schwartz, saluto el Olimpia urbo Melburno de B. M. Vosahlo kaj salutoj de nia estinta membro R. Wenzel el okcidenta Germanio.

El la raporto de UEA al UNESCO ni informas:

**R a d i o.** En la jaro 1955 21 radiostacioj elsendis 1170 programojn en la Internacia Lingvo. El tiuj programoj 312 estis instruaj, 637 havis informan karakteron, dum 221 rilatis al edukaj demandoj. En la jaro 1954 estis 1014 programoj en Esperanto, en 1953 entute 845 programoj kaj en 1952 nur 741. La nombro de Radio-stacioj, kiuj utiligas ankaŭ Esperanton por siaj elsendoj, konstante kreskas.

**L i t e r a t u r o.** En la jaro 1955 aperis entute 104 novaj publikaĵoj en Esperanto. Inter ili troviĝas tre famaj verkoj, ekzemple Sinjoro Tadeo de Mickiewicz, parto de Don Kiĥoto de Cervantes, Tartarin de Taraskono de Daudet kaj aliaj. La angla aŭtorino Marjorie Boulton publikigis kolekto da poemoj, originale verkita en Esperanto, sub la titolo „Kontralte“. Aliaj menciindaj verkoj, originale skribitaj en Esperanto, estas „El la Maniko“ de Reto Rossetti kaj „Koko Krias Jam“ de Ferenc Szilagyi. Estas ankaŭ eldonita libro de selektitaj prelegoj de la Internacia Somera Universitato, en kiu troviĝas kontribuadoj de 11 profesoroj kaj aliaj sciencistoj el diversaj landoj. El la teknikaj terminaroj estas menciindaj la English-Esperanto Chemical Dictionary, publikigita en Londono, La Fervoja Terminaro Esperanto-franca, publikigita en Francujo. Tio altigas la nombron de fakaj terminaroj al 112 por 46 branĉoj de la science, filozofio, tekniko kaj metioj.

**L i s t o d e k u n l a b o r a n t o j** de UEA en la aferoj de UNESCO kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj montras kunlaborantojn en 36 ŝtatoj /Argentino, Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Cejlono, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francujo, Germanujo, Grekujo, Gvatemalo, Hispanujo, Hungarujo, Hindujo, Indonezio, Irano, Izraelo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Kostariko, Meksikio, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Pollando, Svedujo, Svislando, Koreo, Turkujo, Unuigita Reĝlando de Britujo & N. I., Usono, Urugvajo kaj Venezuelo. Kunlaboranto por Ĉeĥoslovakujo estas la prezidanto de TKKE Josef Vitek.

---

KORESPONDI kun tutmondaj esperantistoj deziras s-ano Anton G. HOEKMA, Laan van Eik en Duinen, nro 20, s'Gravenhage DEN HAAG, Nederlando.

---

Recenzo pri „POLLANDO“ ilustrita belega revuo, kiun vi povas mendi ĉe Kniha, Praha II., Václavské nám. 42, estos publikigita en nia oktoda numero. Ĉiu aĉetinto de tiu ĉi modela revuo nepre skribe esprimu sian admiron al la Asocio de Esperantistoj en Pollando, Koziar 3, Warszawa, Pollando.

-----  
Laŭbezone eldonas ESPERANTISTA KLUBO ĉe Osvětová beseda en P r a h a 2.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I.

Respondekas pri la enhavo: Josef Vitek, Jungmannova 24/I., Praha II.

Redakciaj telefonoj: Šustr /EKP/ 63 464, Vitek /TKKE/ 23 83 23.

ZÁPIS Z PŘÍPRAVNÉ PORADY ČLENŮ CELOSTÁTNIHO ESPERANTSKÉHO PORADNIHO SBORU  
V DOKSECH DNE 21. ČERVENCE 1956

Přítomni samideáni:

J. Vítek, Th. Kilian, M. Rudolf, Dr. Vl. Mohapl, Dr. T. Pumpr, J. Vondroušek, A. Evjáková, R. Burda, J. Kožený, F. Matušová, F. Lička, J. Kořínek, Ed. V. Tvarožek, Ing. Št. Veselý, P. Rosa.

Porada zahájena ve 20. h předsedou CEPS J. Vítkem, který v úvodu přečetl zprávu čl. Delegáta Dra J. Jermáře o úspěšném kongresu bulharských esperantistů ve dnech 1. – 3. 7. 1956 v Sofii, kterého se zúčastnil zástupce bulharského ministerstva školství, spisovatel Karaslavov a další představitelé veřejného a kulturního života v Bulharsku a zástupci esperantistů ze zemí lidových demokracií. Dále byli přítomni seznámeni s výsledky dosavadní práce CEPS-u a se situací, která nastala po jednáních ÚV KSČ a MŠK, o administrativně-organizačních přípravách Československého Esperantského svazu /ČSES/ a o přípravách celostátní konference československých esperantistů. Dosavadní postup zástupců CEPS-u byl schválen.

Bylo dohodnuto, že na celostátní konferenci budou pozváni zástupci esperantistů ze SSSR, jmenovitě S. Bokarev, z MLR, PLR, BLR, ČLR, Jugoslávie, Vietnamu a Rakouska. Oznámení o konferenci a výzvu, aby zemské svazy uvedených zemí vyslaly na konferenci své zástupce zajistí s-ano Kožený, předseda org. sekce CEPS-u, kterému s-ano Burda předá pozvání pro tajemníka MEM s-ana Balague. Oficiálně bude dále pozván gen. tajemník UEA prof. Dr. Ivo Lapenna. Je možné, aby českoslovenští esperantisté pozvali jako své hosty na konferenci své zahraniční dopisovatele.

Bylo přikročeno ke čtení návrhu stanov budoucího Svazu Referentem byl s-ano Dr. T. Pumpr.

Ve 23,15 h byla předsedajícím porada přerušena a odročena na 9. h dne 22. 7. 1956.

Zápis z jednání dne 22. 7. 1956

Přítomni samideáni:

J. Vítek, A. Evjáková, Th. Kilian, M. Rudolf, V. Špůr, J. Kořínek, J. Vondroušek, Fr. Lička, Ed. V. Tvarožek, J. Kožený, J. Šustr, F. Matušová, R. Burda, Dr. T. Pumpr, Dr. Vl. Mohapl, P. Rosa, Ing. Veselý.

Nepřítomnost omluvena samideánům: Dr. J. Jermářovi, Kamarýtovi, Fridrichovi, Slanému, Maříkovi, Ehtnerovi, Dolinskému, Čambálovi, Dr. Šaturové a Zvarovi.

Poradě předsedal s-ano J. Kožený.

S-ano Dr. T. Pumpr pokračoval ve čtení a výkladu návrhu stanov a v diskusi, která následovala. Byly projednány doplňovací a pozměňovací návrhy.



Každý návrh byl přítomnými pečlivě zkoumán a na jejich podkladě vypracováno definitivní znění stanov, které nyní budou předloženy ke schválení příslušným úřadům.

Předsedající poděkoval referentu Dru Pumprovi, i přítomným za pečlivou spolupráci a předal slovo tajemníku CEPS-u s-anu M. Rudolfovi, který referoval o průběhu příprav konference v Olomouci a o jejím organizačním zajištění. Referát byl schválen a stanoveny dílčí úkoly jednotlivých samideánů, se kterými již bylo předběžně jednáno, a kteří za splnění těchto úkolů odpovídají. Jejich jména jsou uvedena v závorce za jmenovitým úkolem.

Datum konference: 20. a 21. října 1956.

Místo: Olomouc, sál Julia Fučíka /zajištěno ředitelem DO-Olomouc s. Havelou/

Konferenční nálepky: návrh /s-ano Lachman, Olomouc/, provedení /s-ano Bartošík, Praha/

Konferenční plakát: návrh /s-ano Lachman, Olomouc/ bude předložen ke schválení MěNV a okr.osv.inspektoru s. Doležalovi v Olomouci a jejich péčí a nákladem spolu s DO Olomouc vydán.

Konferenční odznak: návrh a provedení /s-ano Bartošík, Praha/

Organizace přihlášek a ubytování: /s-ano J. Karha, Olomouc, Na hradě 2/.

Pokladna a zřízení zvláštního konta /s-anino G. Čepová, Olomouc/.

Poštovní příležitostné razítko: návrh /s-ano Bartošík/, podání žádosti o právo použití a zřízení zvl. přepážky pro konferenční dny /s-ano St. Římský, Olomouc/.

Povolení ke konání konference: /s-ano Dr. Vl. Mohapl, Olomouc/.

Reportážní film a rozhlas: /s-ano J. Vítek, Praha/.

Informační plánek a pokyny pro účastníky konference /s-anino M. Beranová, Olomouc/.

Informační služba a průvodci zahraničních hostů: /ges-anoj Šmoldasová a Fr. Pospíšil, Olomouc/.

Konferenční zápis: /s-anino N. Pokorná, Olomouc/.

Výstava, soustředění exponátů a jejich expozice /s-anoj B. Nevrlý, V. Šimeček a Lachman, Olomouc/.

Přehledná zpráva pro tisk a rozhlas /s-anoj Dr. Vl. Mohapl a J. Kožený na základě zápisu/.

Sleva na železnici: /s-ano J. Všolek, Olomouc/.

Umělecká režie slavnostního večera /I. část s-ano Zd. Švehla, Olomouc, svolení KOD-Olomouc dal ředitel s. Křupka, II. část s-ano Ant. Seemann, Praha/.

Dále bylo dohodnuto, aby konferenční poplatek činil Kčs 13,-, včetně účasti na Arta vespero.

Bylo konstatováno, že v místě konání konference všechny složky lidové správy, KV-KSČ, okresní osvětový inspektor, DO – jsou v pravidelném osobním styku s přípravným výborem a pomáhají při řešení úkolů.

Tajemník MěNV-Olomouc s. Beneš zajistí pro zahraniční hosty přijetí na radnici a jejich pohoštění po přijetí, což se děje ve spolupráci s R-KNV-Olomouc.

Třetím bodem jednání bylo předložení a zdůvodnění návrhů kandidátů do funkcí. 1. /předsedajících konference, 2./ předsedy Ústředního výboru, generálního tajemníka ÚV, kandidátů a náhradníků do ÚV, 3./ kandidátů do dozorčí rady a budoucích zaměstnanců ČSES.

Navržení a doporučení byli tito pracovníci.

1./ předsedající konference: s-ano J. Kožený /Kutná Hora/ a s-ano Ed.V. Tvarožek /Martin/, čímž budou zastoupeni samideáni z krajů českých i slovenských.

1./ předsedající konference: s-ano J. Kožený /Kutná Hora/ a s-ano Ed.V. Tvarožek /Martin/, čímž budou zastoupeni samideáni z krajů českých i slovenských.

2./ předseda ČSES: s-ano Josef Vítek /Praha/  
generální tajemník ČSES: s-ano Miloš Rudolf /Olomouc/

kandidáti a náhradníci: ges-anoj:

Dr. Jermář /Praha/, R. Burda /Plzeň/, Th. Kilián /Třebíč/, J. Kožený /Kutná Hora/, J. Vondroušek /Brno/, Dr. Mohapl /Olomouc/, V. Špůr /Doksy/, Dr. Izák /Martin/, J. Kořínek /Brno/, Vl. Slaný /Ostrava/, M. Bartovská /Místek/, Fr. Lička /Ostrava/, F. Matušová /Otrokovice/, A. Evjáková /Otrokovice/, J. Werner /Brno/, V. Novobilský /Praha/, A. Slanina /Praha/, J. Cink /Albrechtice/, P. Macek /Mikulov/.

3./ kandidáti do Dozorčí rady:

Bárochová /Praha/, Hašlar /Doksy/, Václavek /Praha/, Pytloun V. /Liberec/, Všolek /Olomouc/, Janda /Kolín/.

zaměstnanci ČSES: samideáni J. Šustr /Praha/, J. Mařík /Praha/.

K otázce jednotného budoucího esperantského tisku, který počne vycházet dne 1. 1. 1957, podal zprávu s-ano J. Vítek. Byla prodiskutována otázka situace na Slovensku a ve spolupráci se slovenskými samideány budou podrobně vypracovány dohody.

S-ano Burda prohlásil, že jakmile vyjde jednotný čs. esperantský tisk, ustane okamžitě ucházet rozmnožovaný orgán /La pacdefendanto/, jehož je vedoucím redaktorem a zapojí se na oficiální celostátní esperantský tisk. Za členy MEM prohlásil, že všichni budou spolupracovat na společně základně ČSES.

Slovenští zástupci podali referáty o situaci hnutí na Slovensku a požádali, aby jim bylo umožněno v Olomouci hodinu před zahájením celostátní konference vykonati volbu řídicího slovenského orgánu, který je požadován stanovami ČSES. Po vykonání voleb a projednání slovenských otázek, zúčastní se celé konference a jejich přítomnost bude tak manifestací za slovensko-českou nejužší spolupráci v esperantském hnutí.

Samideánky Evjáková a Matušová prohlásily, že jejich kroužek v Otrokovicích připraví pro konferenci transparent s nápisem, kterého bude použito pro výzdobu ulice v Olomouci. Vyzývají ostatní kroužky a kraje, aby jejich příkladu následovaly a přispěly tak i po této propagační stránce k zdárnému průběhu celostátní konference. CEPS je přesvědčen, že tohoto příkladu bude skutečně následováno a že konferenční město bude skutečně slavnostně vyzdobeno a že na této výzdobě se budou podílet esperantské kroužky z celé republiky.

Závěrem porady zhodnotil její průběh s-ano Kožený a poděkoval všem přítomným za jejich dosavadní práci, i za to, že zde, v Doksech přispěli svými návrhy ke zdárným výsledkům porady CEPS-u.

Porada byla skončena v 15.00 hodin.

Doksy, 23. července 1956.

Josef Vítek, předseda, v. r.

Miloš Rudolf, tajemník, v.r.

-----  
ZPRÁVA PŘÍPRAVNÉHO VÝBORU CELOSTÁTNÍ ESPERANTSKÉ KONFERENCE:

Na žádost CEPS uspořádají esperantské kroužky v Olomouci celostátní esperantskou konferenci ve dnech stanovených poradou v Doksech. K organizaci této konference byl ustaven zvláštní přípravný výbor /adr.: s. J. Karhan, Olomouc, Na Hradě 2/. Pro všechny účastníky konference, kteří se přihlásí ve stanoveném termínu, bude opatřena 20-25% sleva na dráze. Veškeré platby, týkající se konference, poukazujte složenkou na konto: Státní spořitelna v Olomouci, sm.č. 1100-1, č. ú. 237-247, pro účet 020-1001, /Esperanto/ nebo poštovní poukázkou na Státní spořitelnu v Olomouci pro účet 020-1001 /Esperanto/.

Upozorňujeme, že po uměleckém večeru večeru v sobotu 20.10.1956 nebude pořádána taneční zábava vzhledem k tomu, že konference, jejíž nedělní zasedání má vyřešit závažné otázky, týkající se dalšího rozvoje esperantského hnutí v ČSR., , jest shromážděním pracovním, vyžadujícím plné soustředěnosti všech svých účastníků k vytčeným úkolům.

Pro přátelskou besedu po ukončení uměleckého programu bude účastníkům konference zajištěno místo v přilehlé kavárně Opera. V budově, v níž je konferenční sál, bude uspořádána též výstavka dokumentačního materiálu, týkajícího se esperantského hnutí v ČSR i v zahraničí.

K případným písemným dotazům ohledně konference připojte vždy ofrankovanou obálku na odpověď.

!!!! Dne 25. 8. 1956 stav přihlášených: 108. Neotálejte!!!

-----  
KOMUNIKO DE LA ĈEFA ESTRARO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ EN POLLANDO:

Laŭ decido de la Ĉefa Estraro

La Tutpollanda Kongreso de pollanda Esperantistaro okazos la 27-28 de oktobro 1956.

Dum la Kongreso okazos amuza parto, ankaŭ vizitoj al la tomboj de Zamenhof kaj Grabowski.

---  
KOMUNIKO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO:

En la kadro de la 32-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj okazis la 4-an de julio 1956 jaro, en la ĉirkaŭaĵo de Rila monaĥejo en Rila montaro Internacia Konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de la jenaj esperantistaj organizaĵoj:

1. BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO: Georgi Dolarĉiev, Canko Murgin, Trajana Sparova, Asen Grigorov, Violin Olianov, Ivan Batakiev, Radoslav Triĉkov kaj Tinka Lakova.
2. ĈEĤOSLOVAKA TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO ESPERANTISTA: D-ro Jaromír Jermář
3. FRANCA LABORISTA FEDERACIO: Marcelle Robineau.
4. JUGOSLAVA ESPERANTO-FEDERACIO: D-ro Ivo Boroveĉki, Zvonko Rehoriĉ, Franc Kleĉ, Franjo Vakoun, prof. Dalibor Brozoviĉ.
5. HUNGARA ESPERANTISTA KONSILANTARO: Maria Kenesei, Stefano Egervari, Stefano Temesi.
6. RUMANA ESPERANTISTA MOVADO: Jozefo Petrin, S. Zalmonovici /Simion Zal/, Harabiĝiu Ĝiĝi, Stefan Freamat, Jon Bunescu.

La reprezentantoj de la montritaj esperantistaj organizaĵoj detale pridiskutis sian sintenon al diversaj esperantistaj internaciaj organizaĵoj.

La konferenco unuanime decidis apogi la laboron de Universala Esperanto Asocio kaj rekomendas al la partoprenantaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj ankoraŭ ne membras en UEA, senprokrastan aliĝon.

La konferenco detale pritraktis la eblecon kaj la manierojn de kunlaboro inter la reprezentataj organizaĵoj koncerne la plej bonajn formojn kaj metodojn por disvastigo de Esperanto kaj tiasence unuanime akceptis konkretan programon por kunlaboro en la kadro de Universala Esperanto-Asocio.

Rila montaro, la 4-an de julio 1956.

Prezidanto de la konferenco:  
Georgi Dolarĉiev, p. m.

---  
KOMUNIKO DE HUNGARLANDA ESPERANTO-KONSILANTARO /Gazetara servo/:

Oficialigo de la hungara movado!

Post multjara silento la modeste kunveninta Hungarlanda Esperanto-Konferenco en septembro 1955 en Budapest elektis Landan Konsultan Komitaton. Tiu transformiĝis en novembro al Landa Esperanto-Konsilantaro kaj anoncis sian agadon al la koncernaj partiaj kaj ministeriaj instancoj. Oni atingis post

pli ol duonjara energia, senlaca kaj ekvita klopodo, ke oni ekzamenis la transdonitajn en – kaj eksterlandajn faktoj pri la movado kaj la 25-an de junio la ĉefsekretariato de Hungara Laborula Partio akceptis la prezentitan proponon.

Sur tiu bazo la Popolkleriga Ministerio, Popolkleriga ĉefsekcio, sub n-o 8791-V-52/1956 la Sekvanin leteron sendis al la ĉefsekretario de la Landa Esperanto Konsilantaro, s-ano Lajos Márton – kiu plej multe kunlaboris por realiti la aferon:

„Rilate vian petskribon pri la Esperanto-movado i sciigas al vi la sekvontajn:

1. Ni konsentas, ke la Landa Esperanto Konsilantaro direktu la hungaran Esperanto-movadon.
  2. Ni aprobas, ke la fakrondoj kaj kursoj de la Esperanto-movado funkcii en la zdroj de la kulturhejmoj.
  3. Ni opinias, por celo de la movado la lingvolernadon, per tio la plifortigon de la amikaj rilatoj kun la popoldemokrataj kaj kapitalistaj landoj.
  4. La movado povas el sia propra forto subteni revuon, kies eksterlandan disvastigon ni aprobas. Per la revuo ili popularigu la okazaĵojn de nia popoldemokratio, de nia konstruiĝanta patrujo, plifortigu la rilatojn kun la laborantoj de la popoldemokrataj kaj kapitalistaj landoj!
  5. La Konsilantaro plenumu en socia laboro sian taskon, la necesajn kostojn por sia agado /kursoj, revuo, literaturaj eldonaĵoj, vortaroj, ktp./ oni kovru en la enspezoj de la kursoj kaj per apogoj de la partoprenantoj de la Esperanto-movado.
- La inspektadon de la Esperanto-movado plenumos la Popolkleriga Ministerio.

Budapest, la 1-an de julio 1956

Lajos D o m o k o s,  
anstataŭanto de la supera  
sekcioĉefo.

Per tio la movado ne estas plu ia tolerata kaj privata afero, sed rekonita kaj probita, sub oficiala kontrolo. Tio ebligas – se la hungaraj esperantistoj konscie kunlaboros kaj ofereble hlepos – pluan evoluto. En Hungarlando tiu organizo pli multe taŭgas nun el societa formo. La fakrondoj ricevas hejmon, lumigadon, hejtadon, eble eĉ subvenciojn. La esprimo „socia laboro“ signifas eksterprofesian senpage faritan laboron por la publika bono. Oni atendas ankaŭ la amikan kaj kompreneman kunlaboron kaj helpon de la tutmonda esperantistaro kaj la rekonon de la Konsilantaro, kiel reprezentanto de la hungara movado. Adreso de la ĉefsekretario: Lajos Márton, Budapest XII, Bors-u.2.IV. – de la referanto por eksterlandaj aferoj kaj vicprezidanto: Pál Balkányi, Budapest, II.a./Phkut/Haraszt-u.33.-La prezidando estas Julio Baghy, inter la vicprezidantoj estas ankaŭ dro K. Kalocsay, dro. J. Mátéffy, I. Nelipa, J. Nagy k. a.

---

RAPORTO DE LA LABORKUNSIDO DE HEK KAJ TKKE EN PRAHA LA 16-an de aŭg.1956:

Estraranoj de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro /s-anoj J. Baghy, P. Balkányi, Lajos Márton, dro. J. Mátéffy kaj L. Domokos/ survoje el Kopenhago haltis por 24 horoj en Praha. La halto estis eluzita por la labortraktadoj kun lokaj estraranoj de TKKE /s-anoj J. Vitek, dro J. Jermář, dro T. Pumpr, J. Mařík, V. Echnert, A. Slanina kaj protokolanto VI. Novotný/. Kvankam ne estis farita oficiala konkludo, ĉar la kunveno havis neoficialan karakteron, estis interŝanĝitaj gravaj informoj pri ambaŭflankaj sperte rilate la movadon. Principoj de la konkreta kunlaboro vasta kaj plene amikeca estis plene aprobitaj. Hungaraj amikoj estis informitaj pri la preciza stato en Ĉeĥoslovakio, pri nia Junularo, pri la Verda Ĉaro de Julio Baghy kaj planita ĝia rondvojaĝo, pri la Mondfestivalo en Moskvo reciproke ni ricevis informojn. Hungara delegacio ĝoje atendas sian revidon kun la ĉeĥoslovaka esperantistaro dum la Tutŝtata esperantista konferenco en Olomouc kaj simile invitas jam nun al sia venontjara konferenco, iu okazos en Budapest.

---

Simile en Praha la 15-an de aŭgusto ni havis la honoron kaj ĝojon bonvenigi s-anon Georgi Dolapĉikov, prezidanton de Bulgara Esperantista Asocio, kiu ni same informis pri la stato de nia movado kaj pri nia plano por la plej proksima estonto, ĝoje atendanto lian partoprenon de nia konferenco en Olomouc.

- - -

IMITINDA EKZEMPLO DE POLAJ SAMIDEANOJ.

Antaŭ kelkaj tagoj venis en niajn manojn grandformata belege ilustrita kaj lingve senerara revuo POLLANDO – por la unua fojo en Esperanto /nro 7-a 1956/. Normale ĝi aperas en la lingvoj: pola, angla, franca, germana, hispana kaj rusa. Kun miro kaj envio ni gratulas al niaj polaj amikoj kaj dankas al ili pro la pliproksimigo de la frata Pollando. Nian sinceran gratulon ni tuj ankaŭ esprimis al la Pola Informa Oficejo en Praha. Tuj ni ankaŭ aranĝis la grandkvantan aĉeton de tiu ĉi revo ĉe KNIHA, Václavské nám. 42, Praha II., kie ĉeĥoslovaka esperantistaro facile povas mendi la revuon. Post la tralego de tiu ĉi juklo de revue esprimu vian dankon kaj admiron al la Asocio de Esperantistoj den Pollando, Warszawa, Kozia 3 – al kiu ni ankaŭ esprimas la admiron de nia ministerio por lernejoj aferoj kaj kulturo, kiun eble la pola ekzemplo instigos al simil faro.

----

ESPERANTISTA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO....

/Karaj geamikoj – manas via loko? – kvankam vi diligente laboras! Jes, vi forgesis informi pri la stato de la movado en via loko nian organizan sekciestron Josef Kožený, Kutná Hora! Ne forgesu do por venonta fojo, ĉar vian sciigon legos ne nur ĉeĥoslovaka samideanaro, sed ankaŭ la legantoj entute en 83 landoj, kiuj nian presorganon ricevadas/

BOJKOVICE:

En tiu ĉi regiono de Komenský, dank al fervora samideano Tichoň rekomencas la intereso pri nia movado. Vlárské závody organizis lian informan prelegon pri Esperanto kaj elmontra informa fenestro en la fabriko pelas sian taskon. Kurso preparata por aŭtuno.

BRATISLAVA:

Laŭ la informo de s-anino dr-ino Magda Šaturová estas preparataj grandstilaj aŭtunaj kursoj, kiuj komencos en septembro.

DOKSY:

Somera Kolegio de Esperanto 1956. Antaŭ unu monato estis fermita la pordo de „nia“ fujara lernejo kaj preskaŭ cento da kolegianoj komencis reveni al siaj heroj en ĉiuj partoj de nia ŝtato dissemataj. Post dusemajna energia ĉiutaga laboro ni ĉiuj povas sincere konstati, ke estis farita vere bona laboro. Eluzita estis Ĉiu ebleco por plialtigi la sciojn de la frekventantoj. Ankaŭ ĉiuj societaj entreprenoj de la Kolegio estis sufiĉe altrangaj, ilia vario kontentigis nin kaj de tago al tago altiris ĉiam pli da neesperantista publiko. La ekskursoj nur kompletigis la abundan dusemajnan programon. Speciale bela estis la nunjara harmonio anima, kiu dum pluraj okazoj montris esperantisman vivkoncepton de la kolegiaj frekventantoj. Estis ankaŭ diversaj malfacilaĵoj – loĝejaj, manĝaj, vehraj – sed vere flankaj ili estis nunjare, kiam la perspektivo pri nova esperantista vivo en nia ŝtato ĉarme influis la agadon sur ĉiu nia paŝo. Post agrabla kuesto doloras la disiro – kaj tiu ĉi vere montras sin aktuala ĉiujare en Doksy. - - - Dum la Kolegia dusemajno aperis du numeroj de „Verda Voĉo“ kun varia riĉa enhavo.

NOVAJ ESPERANTO – GLUMARKOJ. Okaze de nunjara Somera Kolegio de Esperanto en Doksy estis eldonita serio da belegaj jubileaj glumarkoj por rememorigi jam la 10-jaran ekziston de la Kolegio. Tiu ĉi jubilea serio laŭ la desegnoj de s-ano Dolfa Bartošík, konsistas el tri specoj de glumarkoj: la ĉeĥlingva kaj esperanta estas propagandaj, la tria memorigas la 7-ajn Florajn Ludojn en Doksy. Krom la normalaj folioj po 25 glm, kuj estas presitaj en kvar diversaj koloroj, aperis ankaŭ en malgranda kvanto specialaj Memorigaj folietoj en du koloroj po nur 6 glm. kun jubilean surskribo „10 jaroj de SKED 1946-1956. Prezo de unu serio /100 glm. Kĉs 6,-. Memorigaj folioj po Kĉs 0,50. Mendoj direktu al s-ano František Pytloun, Jungmannova 29, Poděbrady, ĈSR.

NOVA KURSO en Doksy de post septembro estos gvidata de s-ano Václav Špŭr.



**DUBÁ:**

Unua kurso en tiu ĉi urbo depost septembro. Gvidos s-ano Václav Špůr el Doksy.

**G R A V A A T E N T I G O !** Vi certe bezonas helpon dum la aŭtunaj kurspreparoj! Kun ĝoje ni informas vin, ke Somera Kolegio de Esperanto en Doksy ĵus eldonis su la aŭspicioj de TKKE modernan varbilon kun plej aktualaj informoj, kiuj certe kun granda intereso tralegos ĉiu neesperantisto. Prezo nur reĝia. Mendu tuj ĉe Václav Špůr, Moskevská 453, Doksy u Mách. jez.

**PRAHA:**

Novaj kursoj por infanoj, progresintoj kaj plenaĝaj komencantoj startos la 2-an de oktobro en la klasoj de la lernejo en Praha II., Charvátova ul. 7. Neesperantista publiko estos informita per afiŝoj, kiujn ĵus lasis presi Osvětová beseda. Instruistoj estos pagitaj kaj la kursoj daŭros ĝis fino de majo.

**TRENČÍN:**

Amikaro de Esperanto ĉe la uzino Merina aranĝas kursojn sub gvido de s-ano Ján Lamačka.

**ŽIMROVICE:**

SOMERA ESPERANTISTA TENDARO. Apud Žimrovice efektiviĝis kun plena sukceso 15/7-11/8 la V-a Somera Esperantista Tendaro de la junularo /SET/, aranĝita de la Esperanto-Fako de Domo de Kulturo en Opava. Partoprenis ĝin 90 plejparte junaj homoj el ĈSR kaj el eksterlando: el Hungario I. Ferenczy, junulara org. sekretario de HEK, el Nederlando juna instruisto H. Saalting, el Svedlando G. Nilssen. La ĉefa programo de la tendaro estis kursoj de Esperanto /de elementa ĝis instrua/ kaj studo de literaturo kaj historio, finitaj per ekzamenoj kaj disdono de diplomoj. La posttagmezoj kaj vesperoj estis dediĉitaj al sportoj, kantado, plejparte esperanta kaj al diskutoj en amika internacia medio sen tradukistoj. Okazis ankaŭ dutaga aŭtobusa rendveturo tra Silezio. G. Nilseen alte taksis la tukan flankon de la tendaro kaj skribis i. a.: „Mi ne scias eĉ imagi, ke viaj kursoj havas tiel altan nivelon. Mi klopodos sendi al vi laŭvice miajn infanojn“. Instruis: Echtner, Mařík, Novobilský kaj Novotný. La tendaro konsistis el 22 litetendoj kaj krom kutimaj aferoj ĝi posedis ankaŭ volibalejon, bibliotekan kaj telefonon. SET estis ofte vizitka de aliaj tendaroj /pioniraj/ kaj okazis kulturprogramaj konkursoj inter ambaŭ partioj, ĉirkaŭ la tendara fajro. La vizitantoj eĉ ellernis Esperantajn kantojn kaj dekoris s-anojn Ferenczy kaj Saalting per pioniraj koltukoj. Pri la okazintaĵo raportis Radio Ostrava kaj la hungara ĵurnalo Szabat Nép menciis SET sur la 1-a paĝo.

**RUMBURK:**

Kurso por 10 komencantoj, kurso por progresintoj kaj konversacia, gvidataj de s-ano Jan Zemek. Elmontra fenestro /jam de la jaro 1912/ kaj stacidoma tabulo /de jaro 1924/ informas la publikon pri Esperanto.

**HRADEC U OPAVY:**

Jarkunveno de la Esperantista Junularo en ĈSR okazis 28.7. en kastelo de Regiona Kultur-Centro en Hradec u Opavy. Partoprenis 86 personoj el 34 lokoj de ĈSR kaj eksterlandanoj: Imre Ferenczy, junulara sekretario de Hungarlanda E-Konsilantaro, oficiala delegito de tiu ĉi HEK, poste juna instruisto nederlanda Hend Saalting kaj la sabatan kulturvesperon ankaŭ G. Nilssen el Stokholmo. Salutletero venis i. a. de k-do Hujcz, parlamentaŭ de Ĉina Popola Respubliko. La junularo pritraktis siajn problemojn kaj aktivecon, konstatinte plenumon de ne malgravaj taskoj. Junularaj interes-rondetoj troviĝas en pli ol 20 lokoj de ĈSR. La jarkunveno esprimis la deziron, ke la Junularo havu adekvatan nombron de komitatanoj en la fondota landa esp. asocio.

PODĚBRADY:

Kurso preparata – komenco en oktobro.

GRAVA SCIIGO! BULTENO DE ASOCIO DE ESPRANTISTOJ EN POLLANDO... Ĉiu interesuj ricevos ĝin post alsendo de Kĉs 1,20 en poŝtmarkoj al s-ano Frant. Pytloun, Jungmannova 29, Poděbrady, komisiito de TKKE por la supre nomita oficiala informorgano pollanda.

---

LASTMOMENTAJ SCIIGOJ: Belegaj afiŝoj pri la „Tutŝtata esperantista konferenco“ jam aperis kaj estis dissenditaj laŭ sciigo de la preparkomitato en Olomouc al Esperantistoj Asocioj, federacioj, ligoj kaj reprezentantoj en 43 landoj /Eŭropo 21, Afriko 4, Azio 5, Ameriko 9, Aŭstralio 1, Oceanio 1, Indonezio 1, Antarktido 1/, al la Organizo de Unuigitaj Nacioj, al ĝenerala direktorko de UNESCO kaj al 23 esperantistaj redakcioj en eksterlando. Krome, kompreneble ili estis dissenditaj en Ĉeĥoslovakio. Afiŝo estis projektil de la artisto V. Lachman el Olomouc.

Poŝtgiĉeto kun konferenca poŝta stampo funkcios dum la konferenco en la antaŭsalono de la konferencejo. Projekton por la stampo faris s-ano Dolfa Bartošík, kiu laboras sur la projekto de konferencaj glumarkoj.

Por la partoprenantoj de la konferenco estas preparata 12paĝa broŝuro, kiu enhavas informan parton, planon de la urbo kaj programon de la konferenco.

Ekspozician materialon ĝis nun promesis n u r la SKED /s-ano V. Špŭr/! Ĉiutage alvenas 5-10 aliĝoj kaj la 28-an de aŭgusto 1956 la stato de aliĝintoj estis precize 150.

-----

GEOGRAFIA REVUO kaj MEMBRECO en IGA: por la interesuloj ni anoncas, ke ankoraŭ la finkalkuloj de ĉeĥoslovaka reprezentanto s-ano Inĝ. Štefan Veselý ne estis aprobitaj de la estraro de IGA.

Koncernan anoncon pri la abonsumo kaj membrototizo ni esperas fari en venonta numero.

-----  
Tiu ĉi /7-a/ numero de „TKKE INFORMAS“ aperas kiel aldono de la Bulteno de la Esperantista Klubo en Praha. Elspezojn kovras la nomita klubo.

-----  
-----  
-----  
-----